


**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Kováts

Kunlaborantoj:

Boo Mee Kim-Lindblom

Stefan MacGill

Jennifer Bishop

Raita Pyhälä

ENHAVO

Ronald GATES: <i>Pri la instruado de Esperanto al infanoj</i>	1
<i>Intervjuo kun Lars Forsman (Katalin KOVÁTS)</i>	7
Pri E-instruiloj: <i>Gvidilo por la lernolibro Okulo</i> (Stefan MACGILL); <i>Lernolibroj de Lars Forsman</i> (Raita PYHÄLÄ); <i>Softmemor</i> (Thierry SALOMON); <i>www.edukado.net</i> (Katalin KOVÁTS)	12
Pri kursoj: <i>Profesiigu pri esperantologio studante ĉe UAM</i> (Ilona KOUTNY); <i>E-kursoj en Valamo, Finnlando</i> ; <i>18a Aŭstralia Somerkursaro</i> (J. BISHOP); <i>Nord-Amerika Somera Kursaro</i>	18
Pri konkursoj: <i>Tutmonda Fabelkonkurso</i> (FI); <i>Konkurso por elementlernejanoj</i> (HR); <i>Kvizoj de Juna Amiko</i> (HU)	23
El la landoj kaj sekcioj (GB, FR, HU, CII).....	25
Internaciaj eventoj: <i>CALICO 2002</i> (Stefan MACGILL); <i>Konferenco de NROj ĉe UNESKO</i> (laŭ Renée TRIOLLE).....	29
ILEI-informoj: <i>Nuligo de KF</i> ; <i>Kvazaŭa Lernejo</i> ; <i>Dankanonco</i> ; <i>Financa Raporto 2001, Financa Plano 2002</i> (Boo Mee KIM-LINDBLOM)	33

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.

<m.latorre@uniroma3.it>; <http://lps.uniroma3.it>

Kunordigado, rilatoj kun E-organizo.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, IIU-2030 Érd, Hungario. Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>

Eldona agado (inkl. periodaĵojn).

Sekretario: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150)52387 kaj (+46)708152387 (mesaĝoj).

<agneta.emmanuelsson@liberal.se>

Membraro, sekcioj, komitato.

Vicsekretario: Sabine Trenner, Ruppinstrasse 8, DE-14770 Brandenburg / Havel, Germanio. Tel. (+49 3381) 794312. <trine@snaflu.de>

Rilatoj kun lernejoj, trejnado, junularaj aranĝoj.

Estrarano pri financoj: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175,

<boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Estrarano: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Čačak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>

Lerneĵaj projektoj, universitata agado.

Ronald Gates

Pri la instruado de Esperanto al infanoj

Dum la jaroj 1998 kaj 1999 mi instruis Esperanton en antaŭlernejo. La klasanoj aĝis tri, kvar kaj kvin jarojn. Ilia nombro variis inter dek kvin kaj pli ol tridek.

Estus trafa demando, kiel mi, antaŭa instruisto, esploristo kaj administranto je nur la universitata nivelo, troviĝis en tia situacio. Kaj la respondo devus esti, ke ne pro konstato de bezono aŭ oportuno, sed nur preskaŭ hazarde.

En tiu tempo loĝis en mia plej proksima urbo, Armidale en la nordo de Novsudkimrujo, Aŭstralio, unu alia Esperantisto, laŭ profesio dentisto. Lia fileto vizitadis la lokan Montessori-antaŭlernejon. Frue en la jaro 1998 ties estraro akceptis la proponon de la patro, ke li instruu Esperanton al la infanoj. Li petis min helpi, kaj kompreneble mi konsentis. Tamen en aprilo, tuj antaŭ la unua leciono, li neatendite decidis, ke mankas al li sufiĉe da tempo por plenumi sian proponon. Tion, do, devis mi sola fari.

Sekvis periodo de eksperimentado kaj iom-post-ioma lernado, el kiu evoluis plimalpli definitiva formo de la instruado. En tio multe helpis la kunlaborado en la dua jaro de mia edzino Barbara.



La lecionoj okazis unu fojon semajne, kaj daŭris ĉirkaŭ duonhoron. En la malfrua parto de 1998, pro la kresko de la lernantaro, mi devis dividi la klason en du kaj ripeti la lecionojn.

La infanoj sidis sur la planko en pluraj vicoj. Ĉe nia eniro ekaŭdiĝis junaj voĉoj: "Saluton, Ron! Saluton, Barbara! Saluton! Bonan matenon!

Bonan tagon!" Ni eksidis sur seĝoj jam lokitaj antaŭ la klasanoj. Sekvis kuna kalkulo de la ĉeestantoj. La nov-alvenintoj rapide lernis reciti kun la aliaj "Unu, du, tri, kvar ...", dum per unu mano

mi elmontris grandan kartonpecon portantan la ciferojn kaj ties vortigon, kaj per fingro de la alia indikis laŭvice la infanajn kapojn.

Mi variigis la ordon de la aliaj lecioneroj. Ĉefaj inter ili estis kantado, ludoj kaj la prezentado de ilustritaj rakontetoj, kvankam de tempo al tempo mi enkondukis ankaŭ arojn da simplaj esprimoj jam skribitaj grandlitere sur blanka kartono.

Bedaŭrinde io en la kredo de la montessorianoj malpermesis la uzon de televido, inkluzive de vidbendoj eĉ de la kvalito kaj utileco de Mazi. Mi rimarkis ankaŭ, ke komputoro de la marko Apple restas sur flanka tablo en la ĉefa klasĉambro, laŭŝajne neniam uzita. Kaj eĉ mankis en la klasĉambroj nigraj kaj blankaj tabuloj, pro kio mi devis kunporti jam preparitajn elmontrilojn. La kompenso ante la mankon de vidbendkapablo konsistis en tio, ke estis necese teni la atenton de la infanoj per daŭra aktiveco iliaflanke, ĉu fizika, ĉu mensa - kio sendube stimulis la lernadon.

Ni uzis precipe du formojn de ludo:

Unu estis "Simon diras". La listo de agoj estis sufiĉe granda. "Ekstaru!" "Tuŝu la nazon!" "Manojn sur la kapon!" "Levu la manojn!" "Mallevu la manojn!" "Saltu!" kaj, tuj post tio pro la plankoŝanceliĝo, "Ĉesu!" "Eksidu!" "Fermu la okulojn!" "Malfermu la okulojn!" "Skuu la kapon!" "Montru kvin fingrojn!" "Diru 'Saluton!'" Komence, kune kun ĉiu parolata komando mi montris kartonpecon surhavantantan kaj la vortojn kaj simplan ilustraĵon. Poste mi ofte nur diris la komandon, kun aŭ sen la antaŭa "Simon diras".

Por la alia ĉefa ludoformo mi preparis tridek kvar grandajn kartojn. Duono de ili portis majuskle la nomon de objekto: arbo, aŭto, aviadilo, birdo, domo, floro, horloĝo, hundo, kato, knabino, knabo, libro, ponto, pordo, robo, seĝo, tablo. Sur la ceteraj dek sep mi faris kolorajn desegnojn de tiuj objektoj. Per la kartoj eblis diversaj ludoj. Ni povis disdoni la bildkartojn kaj elmontri unu post alia la nomkartojn, por ke la posedanto de la koncerna desegnaĵo venu antaŭen redoni ĝin. Ni povis disdoni ambaŭ arojn da kartoj, por ke ĉiu infano tenanta vorton sin parigu kun tiu tenanta la respondan bildon. Kaj ni povis simple montri vortkarton, demandante "Kio estas ĉi tio?", kaj vidi kun ĝojo la pli klerajn el la klasanoj sonigi la literojn, ĝis ili prononcis kaj komprenis la nomon.

La infanoj ŝatis rakontetojn. Komence mi skribis angle kaj tradukis en Esperanton simplan version de *Orharulino kaj la tri ursoj*, kaj prezentis ĝin en la du lingvoj. Mi ankaŭ tradukis el libretoj de la lerneja biblioteko kelkajn ilustritajn rakontojn, kiujn la klasanoj jam bone konis en la angla. Tamen mi trovis multe pli efike mem verki taŭgajn rakontetojn en Esperanto, kaj prezenti ilin kun ĉiu mallonga frazo skribita preslitere sur granda folio kaj tie ilustrita kolore. (Kelkajn el la ilustraĵoj faris talenta nepino mia, la ceterajn mi mem.)

Staru ĉi tie du el la rakontetoj, kune kun ilustraĵoj. [Ndlr: la originalan artikolon de s-ro Gates akompanas pliaj 8 rakontetoj, kiujn pro manko de spaco, nun ni ne povas aperigi, pardonu!]

Oskaro kaj la hundo

Oskaro ludis en parko.

Li provis la balancilon.

Li provis la toboganon.

Sub arbo estis sablejo.

Li tie konstruis kaste-

lon. Subite li aŭdis boj-

adon. Hundo aperis kaj

kuris al Oskaro. Oska-

ro timis. Li saltis sup-

ren por ekpreni arbo-

branĉon. Li grimpis sur

la branĉon. La hundo

staris sube kaj bojis. La

branĉo estis maldika.

Ĝi komencis rompiĝi.

Oskaro estis falonta.

Tiam aperis sinjorino. Ŝi etendis manon al Oskaro. Ŝi helpis lin veni

malsupren. La hundo saltis al Oskaro. Ĝi komencis liki lian kruron.

Oskaro tre timis. La sinjorino diris, "Ne timu! Mia hundo estas amikema.

Ĝi volas ludi kun vi." Ŝi trovis pecon da ligno. Ŝi transdonis ĝin al

Oskaro. "Ĵetu ĝin!" Ŝi diris. Oskaro ĵetis la lignopecon. La hundo bojis


pro ĝojo. Ĝi kuris post la lignopeco. Ĝi portis ĝin al Oskaro. Ĝi lasis ĝin

fali ĉe liaj piedoj. "Ĵetu ĝin refoje!" diris la sinjorino. Oskaro ĵetis la

lignopecon. La hundo kuris post ĝi. Ili ambaŭ ĝuis la ludadon.



Li grimpis sur la branĉon. La hundo staris sube kaj bojis.



En la fenestro estis avizo. "Rigardu!" diris Anĝela.

Roberto kaj la glaciaĵo

Roberto piediris laŭ a strato. Li renkontis Anĝelan. "Saluton!" li diris. Ŝi diris, "Kien vi iras?" Li respondis, "Al la loka butikon." "Kial?" ŝi demandis. "Por aĉeti glaciaĵojn," li respondis. Anĝela diris, "Mi ŝatas glaciaĵojn." "Ankaŭ mi," diris Roberto. Anĝela

diris, "ĉu vi aĉetos por mi?" "Mi ne povas," Roberto diris. "Kial ne?" demandis Anĝela. Roberto diris, "Mi havas nur dolaron." "Ho!" diris Anĝela. "Tamen mi iros kun vi." Ili atingis la butikon. En la fenestro estis avizo. "Rigardu!" diris Anĝela. Ŝi voĉlegis la avizon. "Hodiaŭ estas speciala oferto. Aĉetu unu glaciaĵon, kaj vi ricevos duan senpage." Ili eniris la butikon. Ili elvenis kun feliĉaj vizaĝoj. Ĉiu el ili havis glaciaĵon.

Estis necese la unuan fojon doni plenan tradukon en la anglan, frazon post frazo. Sed, ĉar la infanoj ŝatis ripeton de konataj rakontoj, eblis la duan aŭ trian fojon grandparte preterlasi tradukadon kaj eĉ fari, de tempo al tempo, demandojn pri la signifo aŭ sekvo de iu bildo. La tekstojn, sed ne la ilustraĵojn, de dek el tiuj rakontetoj mi prezentos en aldonaĵo al tiu ĉi eseo.

Eĉ pli ol rakontojn la klasanoj ĝuis kantadon. Plurajn el la kantoj mi trovis en eldonita kolekto en Esperanto. La infanoj aparte ŝatis *Mortis la koko*, kaj fakte prezentis ĝin antaŭ granda aŭskultantaro de familianoj kaj amikoj okaze de la lerneja kristnaska festo fine de 1998.



La kanto tekstas: "Mortis la koko, mortis ĝi. Mortis la koko, mortis ĝi. Ne plu kantos ĝi, koko-di, koko-da. Ne plu kantos ĝi, koko-di, koko-da. Koko koko koko koko-di, koko-da. Koko koko koko koko-di, koko-da."


La tekston mi skribis sur granda kartonpeco, por ke la infanoj konatiĝu kun la aspekto de la vortoj. Por instrui la melodiojn mi uzis malgrandan elektronikan klavinstrumenton, kiun mi trovis en la ĉefa klasĉambro.

Alia ŝatata kanto estis *Ruĝa pomo*, kiu uzas la melodion de Frère Jacques:



La unua strofo tekstas: "Ruĝa pomo, ruĝa pomo, estas ĝi, estas ĝi. Pomo estas frukto, pomo estas frukto. Frukto, jes! Frukto jes!" Krom la originalaj tri objektoj (*ruĝa pomo, nigra kato, blua tablo*), mi aldonis ses aliajn (*flava robo, bruna vazo, verda pino, blanka cigno, griza ŝarko, ora suno*); kaj por ĉiu el tiuj mi preparis grandan karton kun la nomo kaj kolora ilustraĵo.

Mi eksperimentis ankaŭ per versio en Esperanto de *Here we go round the mulberry bush*:



Ĝi havis ok strofojn. La unua tekstis, "Ĉirkaŭ la arbo dancas ni, dancas ni, dancas ni. Ĉirkaŭ la arbo dancas ni en malvarma, frosta mateno." Por la postaj sep strofoj mi uzis matenajn agojn, kiajn la infanoj povis mimi: "Tiel la manojn lavas ni"; "Tiel la dentojn brosas ni"; "Tiel la harojn kombas ni"; "Tiel la ŝuojn laĉas ni"; "Tiel la lakton trinkas ni"; "Tiel la gantojn portas ni"; ĝis "Al la lernejo iras ni".

Montriĝis, tamen, ke kanto enhavanta tiom da variado estas iomete tro komplika por la plimulto de la klasanoj: eble ĝi pli taŭgas por infanoj de ses ĝis dek jaroj.

Nur unu kanteton mi mem tute verkis. Temis pri korpopartoj. La melodio estis simplega:



La unua strofo tekstis: "Mi havas unu kapon, jes, kapon, jes, kapon. Mi havas unu kapon. Jes, kapon havas mi."

Je ĉiu mencio de la kapo, kies unuan silabon oni aparte emfazis, la infanoj devis tuŝi sian kapon.

Simile, "Mi havas du orelojn, orelojn havas mi"; kaj "du okulojn"; kaj "unu nazon"; kaj "unu buŝon"; kaj "nur du manojn"; kaj "nur dek fingrojn"; kaj "du piedojn"; kaj "du genuojn".

Por ĉi tiu kanto mi preparis elmontreblajn kartojn, ĉiun kun teksto kaj ilustraĵo, kiujn eblis uzi ankaŭ aliokaze por instruado pri la nomoj de la korpopartoj.

La estrino de la antaŭlernejo sin demandis, ĉu eblas interesigi la lergepatrojn pri Esperanto pere de la infanoj. Laŭ ŝia propono mi verkis kelkpaĝan resumon pri la gramatiko, la prononco kaj tiel plu, kun ekzemploj de oftaj vortoj kaj esprimoj; kaj ĝin ŝi disdonis. Neniu poste petis pluan informon, eĉ malpli lecionon. Tamen mi ja rimarkis, en la gazeto de Universitato de Novanglujo, reklamon pri la "parent-run, non-profit" infanlernejo, sciigantan interalie, "French, recorder and Esperanto taught".

Laŭ mia scio, neniu el la infanoj daŭrigis sian kontakton kun Esperanto, post kiam li aŭ ŝi progresis al elementa lernejo; kaj tian atingon mi ja ne atendis. Tamen mi kuraĝas esperi, ke la plimulto da ili restos konantoj, eĉ se ne sciantoj, de la lingvo, kaj ke tial ili estos des pli impresigema, kiam ili renkontos tiajn influojn, kiaj varbis nin nunajn Esperantistojn.

Krome mi devas konfesi, ke mi mem profitis de la sperto: instrui ne malofte montriĝas la plej efika metodo lerni.

Prof. Ronald C. Gates, <rgates@metz.une.edu.au>
182 Kellys Plains Road, Armidale, NSW 2350, Aŭstralio


ni demandis al...

Lars Forsman,

gvidanto de la Esperanto-fako de
Karlskoga Popola Altlernejo

pri la historio, pedagogia laboro, sekretoj kaj
sukcesoj de la fama 4-monata kursaro,
okazigata jam de preskaŭ 15 jaroj en Svedio.

La konversaci-partnero de Lars Forsman
estas Katalin Kováts.



Kiun rolon havas la instruado de Esperanto en la Karlskoga Popolaltlernejo kaj fakte kiel komenciĝis la afero?

Mi jam instruas pli ol 30 jarojn en la lernejo. Kiel juna lingvoinstruisto mi ricevis la taskon strukturigi la lingvoinstruadon pri la angla kaj germana lingvoj kaj enkonduki instruadon en lingvolaboratorio. En 1984 mi la unuan fojon renkontiĝis kun Esperanto dum iu prelego kaj kelkajn jarojn poste ĉeestis seminarion pri Esperanto. Studinte la lingvon mi rajtis organizi someran kurson kaj la postan jaron inviti partoprenantojn al intensa oksemajna kurso. Ĝi farigis tutsemestra, ĉar la partoprenantoj ne volis iri hejmen. Post ioma hezitado, la estraro donis al mi la rajton starigi Esperanto-fakon kaj preskaŭ plentempe uzi mian ŝtate salajratan oficon por la lingvo, kondiĉe ke mi sukcesos varbi sufiĉe da studentoj.

Do, la unua tutsemestra kurso okazis en 1988 kun 15 scivolemaj gejunuloj kaj viglaj pensiuloj – normala nombro da studentoj. Jam la unuan kurson ni disponis pri propra studanta loĝejo kun unulitaj ĉambroj kaj komunaj kuirejeto kaj TV-ĉambro.

Ĝis nun partoprenis studentoj el 39 landoj eĉ el foraj kaj por ni ekzotikaj landoj kiel Ĉinio, Japanio, Ugando, Islando k.a. La lastajn jarojn mi instruis nur dum la aŭtuna semestro kaj en somera kurso por iom ŝpari energion.

Kiel vi sukcesas trovi partoprenantojn por tiom longdaŭra studado? Kiom kostas entute tia kurso? Ĉu akireblas stipendioj?

La unuajn jarojn la plej multaj estis svedoj foje kun iu eksterlanda leteramiko. Grade disvastiĝis la informo pri la kursoj: kontentaj kursanoj kaj mi mem disdonadis milojn da broŝuretoj dum kongresoj kaj vojaĝoj, la kalendaroj en Esperanto-gazetoj multe helpis kiel ankaŭ informoj en la jarlibro kaj en la reto. Komence batalis mi por esti invitita al gimnazioj por informi en klasoj kaj nuntempe la tieaj instruistoj mem invitas min. Lastaŭtune dum lingvotago en iu gimnazio 350 studentoj elektis duhoran informon pri Esperanto kaj dum la prelego mi interalie intervjuis en Esperanto kelkajn miajn studentojn post nur trisemajna studado. Tio vere efikis! Ofte venas ekz. multe da danoj rekomenditaj de eksstudentoj el la Kosmologia movado en Danio. La kostoj por studado, loĝado kaj manĝado dum kvarmonata kurso estas ĉirkaŭ 1500 dolaroj. Skandinavoj povas ricevi stipendiojn de la Nordia Popolaltlernejo kaj svedaj studentoj ŝtatajn subvenciojn kaj pruntojn por la tuta studtempo.



Surfote: Grupo de iamaj kursanoj: Iva Åberg (ĉekino el Svedio), Lars Forsman, Sofia Barnalowa (el Pollando) kaj Kimie Markarian (japanino el Anglio)

Kiu estas viaj kunlaborantoj? Ĉu vi laboras kun konstanta teamo aŭ ĉu vi venigas ankaŭ gasteinstruistojn? Kiel vi akiras ilin?

Fakte mi mem instruas 20 lecionojn semajne inkl. 4 lecionojn en la lingvo-laboratorio. Ĉiun semestron aliĝas eksstudentoj aŭ pli malpli spertaj esperantistoj dum la lasta periodo por ĝui kelkmonatan esperantan etoson, plibonigi sian ekzamenon aŭ tutsimple helpi kaj instigi en la instruado. Kiam esperantisto faras turneon en nia lando mi ĉiam provas inviti tiun por paroli. Iam Nata kaj Andreo Berce, internacie tre konata muzikista paro, kunlaboris kun mi tutan semestron kaj el tio rezultis ke ni ĉiun tagon kantis kaj krome organizis dumtagan kurson por studentoj el aliaj fakoj kaj tri vesperajn diversnivelajn kursojn. Foje ni daŭrigis la kantadon post la lecionoj en la kafejo eĉ kun senintencaj kunkantantoj. Dum la semestro la familio Berce surbendigis la sonkasedon *Kantu Ni Kune* kaj tiun mi nepre volas rekomendi al ĉiuj kantemuloj en kluboj kaj kursoj. Dum la someraj kursoj la ekonomio permesis al mi inviti spertajn gasteinstruistojn kiel Andreo Pettyn, Sofia Fornalova, Ralf Frölich, Georgo Handzlik, Kimie Markarian, Iva Åberg k.a.

Kiujn metodojn kaj instruilojn vi uzas dum la kursoj?

Mi instruas tute en Esperanto dekomence per desegnoj, bildoj, ĥorrespondoj, vortfamilioj k.s. Foje mi volus ekzercigi gramatikon per tradukado sed ne eblas ĉar la kursanoj ne havas iun komunan lingvon krom Esperanto. Tial mi verkis multe da lerniloj kun malrapide kreskanta progresado. Multaj el ili unue aperis stencilforme kaj post provinstruado kaj proponetoj de studentoj ili fariĝis libroj. La unua lernolibro *Egaleco kaj Paco per Esperanto* nun ekzistas en la sveda, finna, dana kaj rusa lingvoj kaj manskribitaj en la angla kaj ĉina. La lernolibro *Sascha* estas la dua kaj ĝi temas pri germana studento kaj lia partopreno en studado, lerneja vivo kaj la plej popularaj kursoj - ekskursoj. Sekve ni studas la etan bibliografion *Ludoviko Zamenhof*, kun multe da ekzercoj kaj demandoj. Aliaj lerniloj estas ekz. *Ekparolu Esperante*, *Esperanta Gramatiko kaj Ekzercoj*¹. Kompreneble ni uzas ankaŭ aliajn lernolibrojn, artikolojn el diversaj gazetoj, videofilmojn, radioprogramojn, kantojn, la Jarlibron ktp.

¹ NdIR: pliajn detalojn vidu sur paĝoj 13-15.

Kiel aspektas tipa kursotago?

Jen tipa studtago:

Leciono 1: Frazoj surtabule al kiuj mankas finaĵoj, akuzativo, prepozicioj ktp. Gramatika diskutado kaj pli da ekzercoj surstencile.

Leciono 2: Prelegeto de la instruisto kun sekvaj demandoj aŭ "kvinvorta paroleta" de iu lernanto. Li aŭ ŝi ne rajtas uzi paperon, tekston sed nur rakonti laŭ la kvin ŝlosilvortoj.

Leciono 3: Ni tralegas, kontrolas, korektas la hejmtaskojn kaj pridiskutas lingvaĵojn. Nova hejmlaboro.

Leciono 4: Eseo skribado pri bildo, okazaĵo, elektitaj vortoj aŭ aktualaĵo.

Tagmanĝo kiam la vigla esperanta babilado vekas surprizon: „Ĉu ili „studas nur de unu monato“

La kuireja personaro jam al kutimiĝis vidi la verdulojn kiel la lastajn en la manĝejo.

Leciono 5: Individua laboro, kiam la instruisto povas ĉirkaŭiri helpante en la klasĉambro aŭ dividi studantojn en konversaciaj rondoj.

Leciono 6: Lingvo laboratorio. Mi dum la jaroj preparis multe da ekzercoj, lingvaj modeloj, demandoj pri bildoj, aŭskultaj ekzercoj ktp. kiujn la klasanoj buŝe kaj individue prilaboras. Dum la vespero la studentoj rajtas reveni kaj daŭrigi aŭ fini la ekzercojn. Iam iu brava norvego tre intense laboris tiel ke li endormiĝis en sia laboratoria budeto. Je la noktomezo li vekigis kaj hejmenirante li funkciigis la alarmilojn /kaj la pedelon kaj la rektoron/.

Kiu gradon de lingvoscio aŭ lingvoprogreso oni povas atingi dum la kurso?

Diversajn gradojn de lingvokapablo. Iam mi havis spertan lingvo-instruiston kaj interpretistino de EU en la klaso. Fakte ŝi renkontiĝis kun sia itala edzo dum la vintraj ferioj kaj ŝi ĝentile promesis viziti la klason almenaŭ unu lecionon. Ŝi tiel ekinteresiĝis ke ŝi restis la tutan semajnon kaj poste sen problemoj povis komunikiĝi kun vizitanta estona kuracisto en Esperanto. Ĉiuj ŝokiĝis, aparte ŝi mem.

Normale oni bone parolas post kelkaj monatoj, kelkaj tute flue. Sed aliaj bezonas du kursojn por atingi altan nivelon.

Je la fino de la semestro oni superas la Internacian ekzamenon de la lernejo, propedeŭtikan al la ekzameno de UEA. Ĝi enhavas gramatikan parton, eseoskribadon, aŭskultan teston kaj konversacion.

La plej multaj sukcesas en la ekzameno kaj ricevas unu el la tri notgradoj. Kelkaj eĉ hejmeniris por instrui en siaj hejmlandoj. Du el miaj svedaj partoprenintinoj poste iris al Bona Espero en Brazilo por tie instrui Esperanton dum po ses monatojn.

Ĉu vi povas nomi kelkajn "referenc-kursanojn", kiuj esperantiĝis "sub viaj manoj"?

Jen kelkaj: Ralf Frölich fariĝis prezidanto de la junulaj movadoj en Eŭropo kaj eklaboris en TEJO kaj la junula konsilantaro de EU. Lovisa Gustafsson prezidantiĝis en SEJU kaj laboris internacie. Ole Therkelsen nun estas gvidanto de la Kosmologia kursejo Klint en Danio kaj multe vojaĝis kaj prelegis ekster-lande. Eva Otsa ekstudis Esperanton por sia instruista kariero en Estonio. Post la Esperanto ekzameno Basheng Chen ekstudis la svedan kaj post tri semajnoj povis esti intervjuita de la sveda ŝtata radio - en la sveda!! Sara Karlsson fariĝis Bona Espero-instruistino dum ses monatoj. Alia Bona Esperanino fariĝis trobadorino en Esperanto. Tatiana Rudakova starigis Multlingvan Centron en Moskvo. Etsuko Nakasawa, Japanio i.a. konata pro kursoj pri diina masaĝo.

Kiu estontecon havas la kursaro kaj kiom grava ĝi estas por vi persone?

Venontaŭtune mi fakte faros mian lastan semestron antaŭ ol mi pensiuliĝos. Se la estraro de la lernejo volus, mi volonte enkondukus novan instruiston sed temas pri multe da laboro, entuziasmo kaj batalemo -eĉ libertempe. Mia kara edzino iam pli malpli ŝerce diris: "La tutan tagon vi instruas en Esperanto, vespere vi verkas aŭ interparolas telefone dum horoj, sed nokte mi ne volas aŭdi la lingvon." Verŝajne mi okaze prelegetis dum la dormo.

Mi nun ekinstruis ankaŭ en interreta kurso kaj ĝi iel povus anstataŭigi la nunan kurson kaj ankaŭ atingi pli da homoj. Ĝi eĉ povus krei iun instruon reton, bazon por konversaciaj kursoj, someraj renkontiĝoj ktp.

Esperanto signifas multe por mi kaj mi bedaŭras, ke mi renkontis la lingvon malfrue en mia vivo.

Esperanto donis al mi multe da laboro sed eĉ pli da plezuro. La instruista vivo fariĝis multe pli interesa kaj signifa post la "saviĝo", kiel iam televida raportisto sin esprimis.

Nun mi havas amikojn tra la tuta mondo, mi ege ĝojas esti batalanto por tre grava movado en la mondo kaj mi volas daŭrigi verki librojn kaj turmenti redaktorojn de la gazetaro.

Kiam mi ĉi-jare prezidantiĝis en la Sveda Esperanto-Instituto mi ricevis eĉ pli bonan platformon por disvastigi memklaran aferon por la homaro.

Estus bedaŭrinde se la serio finiĝus. Ni esperas, ke troviĝos daŭriganto de via grava laboro pro kiu el la nomo de ĉiuj kolegoj mi elkore gratulas kaj dankas vin.

Datoj de la sekva kurso: 2/9 - 21/12. 2002. Kontaktadreso: Lars Forsman, Karlskoga Folkhögskola, SE-691 24 Karlskoga. Telefono: 0586-646 00, 548 11. Fakso: 0586-646 22. E-poŝto: lars.forsman@fhsk.karlskoga.se

pri E-instruiloj...

1) Stefan MacGill: Gvidilo por la lernolibro Okulo

Aperis en 1999 la unua kajero de lernoserio *Okulo*, kiun ILEI mendis kaj eldonis por la pli junaj lernantoj en la tiam lanĉata projekto Interkulturo. Tiu kajero estas abunde ilustrita, kun plenkoloraj paĝoj, kaj celas lernantojn inter 6- kaj 10-jaraj. Ĝi prezentas 440 radikojn, inter kiuj 40 verboj. Ĝi inkluzivas du partojn de bildstria serio "Mira, aventuroj de Detektivo".

La gvidilo provas helpi al instruistoj uzi la kajeron pli produktive. La komencaj dek du paĝoj prezentas laŭpaŝan resumon de la lernanta kajero, kun la sekvaj rubrikaj: Komunikaj celoj, Gramatiko, Novaj vortoj (verboj, substantivoj, aliaj), Prononcado, Konsiloj. La cetero de la gvidilo prezentas ekzercojn de plej diversaj tipoj: vera/malvera, unu el kvar, miskitaj literoj, ordigu frazojn, paroligaj, transformaj, spac-plenigaj. Estas pluraj paĝoj da bildekzercoj. Multaj ekzercoj havas kaŝfrazojn, por stimuli plenumon kaj doni konfirmon pri ĝusta respondado. Gvidilofine aperas solvoj por la ekzercoj. La ekzercoj estas aranĝitaj laŭ paĝparoj, por

ke instruistoj povu facile fotokopii ilin por krei klas-kompleteojn de task-folioj. Sur unu malfermo aperas konciza tabelo resumo de la lernanta kajero, por orientigi instruistojn.

Okulo 1, Gvidilo, Stefan MacGill. ILEI, Budapeŝto, 2002. Ilus. Mónica Molnár, 22cm. 52p, ISBN 963 00 9802 4. Prezo: 4,50 EUR (sama prezo kiel la lernanta kajero). Havebla ĉe UEA, kun sesona rabato ekde 3 ekz, plus sendokostoj. Ĉe ILEI, triona rabato ekde 3 ekz (de gvidilo aŭ lernanta kajero), kun sendokostoj inkluzivitaj. Rabato 50% por klasoj de "Interkulturo" por mendoj ekde 9 kajeroj (lernantaj aŭ gvidila).

2) Raita Pyhälä: Lernolibroj de Lars Forsman

Baza lernolibro

Iam en la unuaj 1990aj jaroj mi serĉis lernolibron por unusemajna komencanta kurso 20-hora. Mi trovis "Egaleco kaj Paco per Esperanto" de Lars Forsman. Ĝi tuj ekplaĉis al mi, malgraŭ sia ne-luksa aspekto: verdaj kovriloj, nigrablankaj malgrandaj desegnaĵoj, lingvaĵo, kiun oni povas uzi kaj paroli ekde la unua leciono. Al mi tre gravas tio, ke kvankam miaj lernantoj ne povus ellerni Esperanton dum semajnfina aŭ unusemajna kurso, al ili restos libro, kiun ili povos memstare uzi por plulernado, des pli, ĉar la libro enhavas ekzercojn kaj la bezonatajn solvojn.

Kiam mi pli akre pristudis la lernolibron, mi rimarkis, ke iom svedeca kaj skandinavia ĝi estas kaj mi devas iom modifi la gramatikerojn por ke ili helpu finn-parolantojn, sed tio ne ĝenis min. Mi finigis la vortlistojn kaj la gramatikajn klarigojn kaj samtempe malkovris la humuron kaŝitan en la etaj desegnaĵoj, kiuj vere taŭgas por paroligi la lernantojn kaj eviti tradukadon. La finna eldono aperis antaŭ kelkaj jaroj kaj dua estas pretigata. Krome, "Egaleco kaj Paco per Esperanto" jam aperis ankaŭ en la dana kaj rusa kaj estas tradukita en ĉinan kaj anglan lingvojn.

Post la lernado de la alfabeto oni tuj komencas paroli kaj legi. La metodo estas simpla kaj praktika, mi nomus ĝin rekta, ĉu vere, tio dependas de la instruisto. Oni lernas prezenti sin, kalkuli, aperas la demandaj vortoj "kio" kaj "kie". Sekvas konkretaj substantivoj pri ĉiutagaj hejmaj objektoj kaj kun ili prepozicioj, difina artikolo, trinkaĵoj, koloroj, adjektivoj. La instruisto mem povas decidi la rapidecon, la teksto de la libro ne estas

klare dividita en "lecionojn". Estas lernataj kelkaj verboj kaj la -as-tempo kaj komenciĝas la intrigo, kiu kunligas la reston de la lernolibro: itala junulo korespondas kun svedino, ili renkontiĝas, laboras, studas kaj – vi divenis – enamiĝas kaj geedziĝas. Utila por la lernanto kaj la instruisto estas, ke la gramatikaj aperas en malgrandaj dozoj, kiuj ripetiĝas kaj akumuliĝas.

En la fino de la libro troveblas listoj pri la afiksoj kun priaj ekzercoj, tabelvortoj, ok gravaj reguloj pri la finaĵoj -a, -o, -n kaj -e kun respektivaj ekzercoj, -ig kaj -iĝ, aktivaj kaj pasivaj participoj. Kondicionalon kaj pasivon la libro ne instruas. La fina laŭalfabeta vortolisto en la originalo estas Esperanta-sveda, en la tradukoj kompreneble E-traduklingva.

Lernolibro progresiga

Post la baza lernolibro estas interese labori surbaze de tekstoj, kiuj rakontas pri interesa studanto ĉe Karlskoga. La libreto havas ankaŭ ekzercojn kaj solvojn.

Daŭriga lernolibro

La lernolibreton Ludoviko Zamenhof (sesdeko da paĝoj) kun ekzercoj por progresantoj mi uzis, kiam mi gvidis du grupojn, komencantan kaj progresantan, samtempe. La progresantoj memstare laboras kun la libro en apuda ĉambro, kaj mi nur kelkfoje vizitas ilin por vidi, ĉu aperis problemoj. Ne multaj aperos, ĉar la libro enhavas la solvojn de la ekzercoj. Helpe de siaj notoj la progresantoj rapide reiras al la demandadoj dum miaj vizitetoj. La libreto, tute Esperanta, enhavas ĉarmajn desegnaĵojn de Kurt Frisk pri Zamenhof kiel knabo kaj plenkreskulo kaj rakontas pri lia vivo ĝis la kongreso de Bern (1913).

Paroligaj ekzercoj

Ne ĉiu lernas Esperanton en kelkaj horoj, kiel laŭdire faris Tolstoj. "Ekparolu Esperanton" (kvindeko da paĝoj) ripetas kaj firmigas la instruitaĵojn de la baza lernolibro, sed ne necesas koni tiun libron por daŭrigi per "Ekparolu". La mallongaj listoj kun ĉ. 250 vortoj reliefigas "internaciajn", tuteŭropajn vortojn kaj estas Esperanta-svedaj, sed se alilingvanoj uzas sialingvan vortaron, ili facile eklaboras.

La libreto taŭgas kaj al komencantoj kaj al daŭrigantoj kaj donas temojn por diversnivela praktika interparolado aŭ verketado: rakontu pri bildo, trejnu vin pri laŭtlegado de numeraloj (jaroj kiam okazis io memorinda), fipensu frazon kies komenco enestas, elpensu ki-demandojn, faru

vortojn uzante afiksojn, rerakontu anekdotojn uzante helpvortojn. La moto estas: "Vi pensas internacie! Kial ne paroli internacie?" – kaj en la fino la maturiĝon de la homaro montras "La Borso 2087", kie la akcioj de Bomboj AK draste devaloriĝis kaj tiuj de *Savu La Infanojn* kaj *Esperanto* plivaloriĝis. Tio montras la humanan forsmanan ideologion. La libreto konvenas por gruplaboro en amika etoso, aktiva lernantoj kaj sciigas ilin pri la historio de Esperanto: Zamenhof, Lingve Universala, aliaj planlingvoj, radioelsendoj, antaŭjuĝoj, "litera turo", kiel utiligi E-on ktp.

Skribaj ekzercoj

En "Ekzercoj en la internacia lingvo Esperanto 1" la klarigoj kaj novaj vortoj estas skribitaj kvarlingve: en la franca, angla, germana kaj sveda. Internaciaj grupoj povas uzi ĝin, se almenaŭ kelkaj grupanoj scias iun el tiuj eŭropaj lingvoj. La libro estas en la formato A4, havas centon da paĝoj kaj spacon por la farendadoj de la lernanto. Ĝi estas tiel-nomata "laborlibro" kaj ne enhavas solvojn. La ekzercoj komenciĝas per simplaj konkretaj substantivoj, prepozicioj, numeraloj, nomoj de landoj (en -io formo) kaj de urboj, sinpresentado - iom kiel en la lernolibro "Al paco ..". Ĝi trejnigas la lernantojn pri substantivoj, verboj, adjektivoj, numeraloj, demandado, vortfarado, korelativa tabelo, reliefigante la gravecon de la bazaj finaĵoj -o, -a, -e, -n. En la fino la aŭtoroj bonvenigas la lernantojn al Ekzercoj 2, kiu ne ankoraŭ aperis.

L. Forsman verkis ankaŭ svedlingvan gramatikon. Laŭ mi la avantaĝoj de liaj libroj estas la modera prezo, praktika uzebleco, humuro kaj pacema vivkoncepto, tamen ne tro altrudema.

3) *SoftMemor*: Helpilo por lerni, instrui kaj diskonigi Esperanton



- **Lerni:** *SoftMemor* estas praktika komputila programo por lerni vortojn kaj gramatikon surbaze de demandaroj.
- **Instrui:** Ĉu vi jam spertis, ke dum instruado vi ne povas antaŭeniri tiom rapide kiel vi volus ĉar la lernantoj ne rememoras la vortojn de la antaŭaj lecionoj? Ludante solaj aŭ konkursante inter si la lernantoj pli volonte kaj efike lernos la vortojn.

- **Diskonigi:** Krom en Esperanto, la programo estas uzebla en aliaj

lingvoj. Tiel la uzantoj kiuj ne konas Esperanton vidas, ke ĝi rolas en la listo de la elekteblaj lingvoj, ekzistas kaj estas uzata en la praktiko. Pro tio la helpilo estas ankaŭ donac-ideo por geamikoj, infanoj, genepoj, genevoj aŭ gekuzoj. Dum iliaj studoj ĝi helpas al ili lerni historion (datoj...), geografion (ĉefurboj/landoj ktp) aŭ naciajn lingvojn.

Pliaj detaloj:

Ĝi pridemandas je hazarda vicordo laŭ dezirata direkto (lingvo1→lingvo2 aŭ lingvo2→lingvo1) kaj kalkulas la elcentaĵon de bonaj respondoj.

- Ĝi jam enhavas ĉirkaŭ 50 pretajn demandarojn: Esperanto (400 bazaj radikoj, tabelvortoj, sufiksoj, prefiksoj, gramatikaj testoj ktp...), ĉefurboj kaj landoj, germanaj kaj anglaj neregulaj verboj ktp...

- Vi aŭ viaj lernantoj povas facile krei pliajn demandarojn per simpla tekstoredaktileto por adaptiĝi al la lernomaterialo. Eblas interŝanĝi la demandarojn kun aliaj uzantoj (sur disketo, per retroŝto aŭ per nia hejmpaĝo).

- La demandaroj povas esti "truaj" testoj, enigmoj, laŭtemaj listoj ktp.

- Eblas ludi per pluraj demandaroj samtempe (ekzemple per la vortolistoj de pluraj lecionoj). Eblas elekti ĉu oni entajpu la respondon, ĉu la komputilo aŭtomate korektu kaj ĉu la programo redemandu la malbone responditajn demandojn je la fino.

- Ĝi funkcias sub Windows 95 kaj sekvaj, Mac OSX kaj kelkaj versioj de Linux. Eblas uzi la programon en la sekvaj lingvoj: internacia, hungara, germana, angla, franca. La demandaroj povas esti en aliaj lingvoj.

- Prezo: 10 EUR (+5 EUR por la sendokostoj). La aĉetantoj ricevas laŭnomman version kaj rajtas ricevi senpage la sekvajn versiojn.

- Liverita kun senpaga konvertilo por Esperanto-literoj kaj kvar aliaj senpagaj iletetoj. Sur la KD estas ankaŭ donacoj: E-litertipoj, E-tekstoj, voĉo de Zamenhof.

- Rabatoj por grupaj mendoj kaj ebleco fariĝi peranto.

Pliaj informoj kaj mendo ĉe Thierry SALOMON

abonasoft@pro.hu, <http://abonasoft.netfirms.com>,

ABONASOFT Bakáts u. 1/3 III.1. HU-1093 Budapest,

Hungario, Tel: +36 1 217 3912

Faksilo: +36 1 328 0294 - Poŝtelefono (WAP):

<http://tagtag.com/abonasoft/>



4) Ĉu ...

- informoj pri lerniloj, libroj, eldonaĵoj?
- retaj kursoj kaj e-forumojn?
- kursmaterialo por iu konkreta temo?
- ebloj aldoni viajn proprajn ekzercojn?
- informoj pri la UEA/ILEI ekzamenoj?
- listo de disponeblaj instruistoj?
- sinofertoj por gvidi kursojn, prelegi ie en la mondo?
- anoncoj pri edukado?
- diskutejo?
- kurso-kalendaro?


www.edukado.net

edukado.net

La servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto

1) Profesiîgu pri esperantologio studante ĉe UAM!

Nuntempe, kiam Eŭropo unuiĝas kaj tutmondiĝo forigas barojn inter nacioj, la lingva problemo ankoraŭ akre manifestiĝas. La esperantistaro proponas sian kontribuon al la solvo: sendiskriminacian dialogon inter kulturoj. Por fariĝi serioza partnero, necesas havi profesiulojn, kiuj havas kapablojn, sciojn kaj diplomon por entrepreni la taskojn de instruistoj, tradukistoj aŭ interpretistoj. Ĉu ni rajtas postuli samajn rajtojn en lernejoj aŭ en internaciaj organizaĵoj sen havi similajn bazojn? Malfacile! UEA emfazas **profesiîgon** kaj sekve la rolo de instruado en sia Strategia Plano kaj **universitata instruado** iĝis elstarigita celo de ILEI.



Surfote Ilona Koutny kaj Humphrey Thonkin kun grupo de gestudentoj.

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM) en Poznan, la dua plej granda universitato en Pollando ofertas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La **internacia kurso** okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj John Wells, Humphrey Tonkin kaj Michel Duc Goninaz; doktoroj Vera Barandovska-Frank, Detlev Blanke, Zbigniew Galor,

Katalin Kováts (Smidéliusz) kaj Blazio Vaha; la poetino Lidia Ligeza kaj István Ertl.

La **Interlingvistikaj Studoj** donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevos specialan rolon en la instruista trejnado dum la sekva periodo.

Surloka kurso (unusemajna sesio) okazos unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵojn kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

La unuaj gestudentoj (el Ĉeĥio, Germanio, Makedonio, Usono kaj Pollando) diplomiĝos ĉi-jare. Ili havis unusemajnan sesion fine de januaro 2002. Ĉi-foje Dr hab. Detlev Blanke (Humboldt Universitato, Berlin, DE) prelegis pri la nuntempa stato de interlingvistiko kaj ĝia rolo en eŭropa lingvopolitiko, krome prezentis la terminologian agadon de Wuster. Prof. Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, USA) donis superrigardon pri la e-movado de la komencoj ĝis nun ĉerpante ankaŭ el siaj riĉaj travivaĵoj. Aliajn 8 horojn li dediĉis al la analizo de esperantaj poemoj. La unuaj tagoj estis malfermitaj al pli granda publiko. Tiel alvenis ankaŭ Georgo Handzlik, kiu kantis al la partoprenantoj kun gitarakompano lunde vespere, post la scienca programo, dum la tradicia ĉina vespermanĝo ĉe Tintilo kaj Joakimo Werdin. La sesio estis tre sukcesa. Pri ĝi raportis regionaj radiostacio kaj televido WTK. La televida stabo filmis fragmenton el la kurso de Blanke, intervjuis Tonkin kaj la partoprenantojn, poste invitis Ilona Koutny, la gvidantinon de la Studoj por enstudia interparolo. Entute 10 minutoj de la vespera novaj-programo estis dediĉita al la eŭropa lingvoproblemo, Esperanto kaj interlingvistika sesio.

Partoprenantoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2002/2003 ĝis la 15-a de aŭgusto 2002. Pli frua anonco estas bonvena.

Postuloj: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de esperanto. Partoprenantoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj.

Kotizo por unu semestro: 400 EUR (por nepagipovaj landoj ĉ. 120 EUR).

Por **pluaj informoj kaj aliĝilo** kontaktu d-rinon I. Koutny: Lingvistika Instituto de UAM, ul. Miedzzychodzka 3-5. PL-60-371 Poznan, T: +48-61 829-27-09, F: +48-61 829-27-00 (sekr-ejo), E: <ikoutny@amu.edu.pl>.

La septembra sesio (23-27.09.2002) estas kunligita kun la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES, same en Poznano, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon (kun teatraĵoj, muziko, diskutoj, ktp.). Se la studentoj bezonas lingvan perfektigon, ni pretas aranĝi **supera-nivelan intensan lingvokurson** (unusemajnan) antaŭ la septembra sesio kontraŭ kroma kotizo.

d-rino Ilona Koutny

2) Esperanto-kursoj en Valamo, Finnlando

Dum du pasintaj someroj okazis sukcesaj E-kursoj en Civitana instituto de Valamo en Heinävesi. Jam 53 kursanoj povis ĝui bonegan instruadon kaj multflankan programon en trankvila monaĥeja ĉirkaŭaĵo.

Ankaŭ ĉi-somere eblos partopreni E-kurson en Valamo. La kursoj okazos ekde la 1-a ĝis la 5-a de julio 2002. Denove okazos trinivelaj kursoj: elementa, daŭriga kaj diskuta. Instruos Sylvia Hämäläinen kaj Atilio Orellana Rojas. Ĉiuj tri grupoj havos komunan programon vespere, ekz. farante ekskursojn en la ĉirkaŭanta bela naturo. Eblas krome laŭvole konatiĝi kun vivo en grek-ortodoksa monaĥejo.

La aliĝkotizo de la 5-taga kurso estas 249 eŭroj (1-lita ĉambro) aŭ 215 eŭroj (2-lita ĉ.) en hotela nivelo kaj respektive 198 eŭroj kaj 182 eŭroj en gasteja nivelo. La kotizo inkluzivas tranoktadon, instruadon, matenmanĝon, lunĉon kaj vesperan teon tage kaj jaude vespere anstataŭ vespera teo bankedon. Alvenonte la 30-an de junio oni ne bezonos krompagi pri la ekstra tranokto.

La kursojn aranĝos la civitana instituto, sed ĉar la institutaj oficistoj ne parolas esperanton, eksterlandanoj nepre aliĝu pere de Esperanto-Asocio de Finnlando, adr. Broholmogatan 15 C 65, 00430 Helsingfors, tel +358-9-715 538 (deorado marde vespere, alitage respondilo), reĉpoŝto: sekretario@esperanto.fi kaj prezidanto@esperanto.fi

Bv. nepre informi la celitan kursnivelon kaj elekti nur unu. Limdato de la aliĝo estas la 31a de majo. Aliĝante vi povos interkonsenti pri pagmaniero. Ĉiuj aliĝintoj ricevos poste konsilojn por vojaĝi al la kursloko kaj pri la loko mem.

Esperanto-Asocio de Finnlando

Instruista seminario post la finnlanda kurso

La semajnfino post la E-kurso en Valamo, Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj okazigos seminarion por instruantoj de Esperanto. Atilio Orellana Rojas konatigos nin kun manieroj instrui la lingvon. Bonvenaj partopreni estas ankaŭ esperantistoj kiuj neniam instruis Esperanton, sed kiuj prikonsideras tion fari iam estonte.

La kostoj por la kurso estas 131, 140 aŭ 156 eŭroj depende de la loĝkondiĉoj. La plej favora estas unupersona ĉambro en la gastdometo. La aliaj estas por du- aŭ unulita ĉambro en la loĝejo. La prezoj inkluzivas ĉiujn kostojn.

Pli da informoj: *Carola Antskog, Prezidanto de ELFI, Dragsfjärdsvägen 690, FI-25700 Kimito, +358-2-423133, cantskog@kolumbus.fi*

3) 18a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto

Perto, la plej fora ĉefurbo de la mondo, izolita ĉe la okcidenta marbordo de Aŭstralio, bonege gastigis la 18an Aŭstralian Somerkursaron de Esperanto kaj Jarkunvenon de AEA. Ĉeestis proksimume 60 partoprenantoj, inkluzive de D-ro Nguyen Vinh el Hanojo, Vjetnamujo, s-ino Franciska Reisel el Frankfurto, Germanio kaj s-ino Niza Kuiterman el Nederlando, dum 25jaroj membro de ILEI.

La ampleksa programo konsistis el ĉiutaga kurso je kvar niveloj. En ĉiu nivelo estis du profesiaj instruistoj. Instruis Atilio Orellana Rojas, Penny Vos, Franciska Toubale kaj Marcel Leereveld.

Posttagmeze, krom plia kurso por la komencanta grupo diaspora, proponatis ankaŭ kantado, preparado por ekzamenoj je la baza kaj meza niveloj kaj Cseh seminario nivelo 'A'.

Aktora kaj Muzika Konkursoj inter la provincoj de Aŭstralio bone distris dum du vesperoj. Eblis ankaŭ ekskursi per ŝipo sur la bela kaj larĝa rivero Swan, per tramo tra la freŝa kaj histori-plena ĉefurbo [*vidu la foton sur la sekva paĝo!*], Perto kaj ĝia parko, kaj per aŭtobuso tra la havenurbo Fremantle antaŭ ol viziti kaj esti enkarcerigitaj en la malnova kaj fantomplena malliberejo!

Interalie, oni profitis ankaŭ interesajn prelegojn de Atilio Orellana Rojas pri Indiĝenaj Dialogoj, de Juĝisto Kep Enderby, eks-prezidanto de UEA, pri Oceanio, de D-ro Ralph Harry iama aŭstralia ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj, pri la traktado de rifuĝintoj, aktuala temo en Aŭstralio, kaj de D-ro Nguyen Vinh pri Vjetnamujo.

Viktorio gajnis la Ŝildon por aktorado, kaj Kvinslando la Ŝildon por kantado. Du ruĝaj rozplantoj simbolantaj pacon kaj amikecon estis plantitaj ĉe la loĝejo, Kolegio Sankta Georgo de Universitato de Okcidenta Aŭstralio.



Plej grave, ĉe la jarkunveno de AEA, la membraro akceptis la proponon de la estraro starigi elspez-prioritataĵojn por 2002 sub la tri rubrikoj Informado, Instruado, kaj Eksteraj Rilatoj, kio inkluzivas antaŭenigi ligojn pro la nova komisiono pri Oceanio.

Pro nuntempa manko de homfortoj en Tasmanio, la estraro akceptis la inviton de Viktorio okazigi la 19an Aŭstralian Somerkursaron de Esperanto en januaro 2003, sed prefere en alia urbo ol Melburno por ebligi varbadon de novaj interesotoj! Atentu la kalendaron!

Bv noti la datojn de **19a Aŭstralia Kursaro de Esperanto: de la 5a ĝis la 17a de januaro 2003**. Pro manko de prepar-tempo ĝi okazos denove ĉe Internacia Domo, Parkville, Melburno.

Jennifer Bishop,

*President, Australian Esperanto Association Inc., Faculty of Education,
PO Box 6, Monash University, Victoria 3800, Aŭstralio*

✉: esperanto@Education.monash.edu.au

4) Nord-Amerika Somera Kursaro en Nordoriento

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko kaj la Esperanta Scienca Fondado kunaŭspicias la 33an ĉiujaran someran Esperantan kursaron 8-26 julio, 2002. La unuan fojon en sia longa historio la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) okazos en la usona Nordoriento. La mondfama "School for International Training" (Altlernejo por internacia trejnado) en Brattleboro, Vermonto, proponas aparte taŭgan lokon por studi Esperanton en vere internacia etoso.

Kursoj okazos en 4 niveloj (komencanta, progresintaj I-II, supera), ĉiu kurso koston USD 900. Loĝado en dupersona ĉambro (kaj tri manĝoj tage) USD 640. Por garantiita loĝado, mendoj estas ricevendaj antaŭ la 1a de junio.

Riĉigaj eblecoj: Divers-specaj vesperaj kaj semajnfinaj program(er)oj donos pliajn eblojn neformale esplori multajn aspektojn de Esperantaj lingvo kaj kulturo. Tiuj eventuale inkludos ludojn, grup-kantadon, prikulturajn prelegojn, lumbildajn prezentaĵojn, poeziajn vesperojn, oratoradon, interkulturajn diskutojn, piknikojn, kaj ekskursojn. Partoprenantoj kiuj volas proponi specialan programeron, bv. turni sin al Ellen Eddy.

Pli da informoj: <http://www.esperanto.org/nask> aŭ <http://www.sit.edu/esperanto>

pri konkursoj...

1) Tutmonda fabelkonkurso invitas infanojn verki

Paatalo-Instituto estas verkista edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Ĝi estas nomita laŭ Kalle Paatalo, eminenta verkisto, kiu naskiĝis en Taivalkoski. Unu el la agadoj de la Instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj, kiu okazas ĉiujare jam ekde 1994.

En 2000 la Instituto eksperimente aldonis al la konkurso Esperantlingvan branĉon laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkylä, unu el la vilaĝoj en la komunumo Taivalkoski. Pro bonaj spertoj ĝi estis ripetita en 2001, kiam UEA aŭspiciis ĝin kaj donacis libropremiojn al la gajnintoj. En ambaŭ fojoj finnaj gazetoj multe raportis pri la Esperanta branĉo. Ankaŭ

ĉi-jare la konkurso havas E-branĉon, kiu denove okazas sub aŭspicio de UEA. Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas aŭ ankoraŭ studas Esperanton. En la konkurso estas tri kategorioj: A) infanoj ĝis 9-jaraj; B) 10-11-jaraj; C) 12-14 jaraj. La konkursaj povas esti verkitaj de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejoj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaj estos taksitaj aparte. La longeco de la konkursaj ne estas fiksita. La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesigu pri la uzado de la lernita lingvo, daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon.

La konkursaj devos atingi la organizanton plej laste la 20-an de septembro 2002. Oni adresu ilin al: *Paatalo-Instituto, PL 39, FI- 93401 Taivalkoski, Finnlando*. Oni skribu sur la koverto la vorton *Fabelkonkurso*. Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu la konkursanto estas grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso: *Aini Vaaraniemi, Vaarajarventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando (rete: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi)*

La hejmpaĝo de la Instituto estas www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti kaj ĝia retadreso estas instituutti@taivalkoski.fi. Pri la fabelkonkurso bv. tamen korespondi nur kun la komisiito (vd. supre). La direktoro de la Instituto estas Osmo Buller.

2) Konkurso por element-lernejoj en Kroatio

Kadre de la 5a Kongreso de kroataj esperantistoj kiu okazas en Rijeka, en la apuda urbeto en E-domo en Kostrena okazas konkurso pri kono de E-o por lernejoj. Per la projekto oni aktivigas ĉemarbordan E-domon de E-Societo en Rijeka, kiu estonte bonvenigas ankaŭ alilandajn infanojn samkiel aliajn esperantistojn kun siaj aranĝoj. Pluraj kroataj lernejoj anoncis siajn lernantojn al la konkurso kaj fincas restadon kaj veturkostojn. La konkurso pri la lingvokono kaj kono pri historio de E-o okazos la 1-an de junio 2002. Samtempe en Rijeka renkontiĝas esperantistoj por Alp-Adria Konferenco kaj por Mezeŭropa konsultiĝo. La detaloj ĉe Kroata E-Ligo, Kneza Mislava 11, tel 385 1. 4617 550, fakso 385 4619373, reto esperanto@zg.tel.hr

Spomenka Stimec

3) Kvizoj de Juna Amiko

Juna Amiko, internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj jam de pluraj jaroj regas siajn abonantojn per interesaj tasketoj, kiujn ĉiu rajtas solvi kaj la solvojn sendi retroŝte aŭ letere al la donita adreso. Vizitu ĝian hejmpaĝaron: www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto kaj elektu la subtitolon 'Kvizolisto' post kiu ĉiam (4 fojojn jare) vi trovas la aktualan kvizon.

Se la kvizoludo plaĉas al vi, unue provu vi mem, poste, rekomendu ĝin al viaj geamikoj aŭ kursanoj, al kiuj vi povas helpi per konsiloj kaj libroj, broŝuroj, se necese (sed neniam faru la solvojn anstataŭ ili).

Géza KURUCZ, red. de JA (suli267@szeged.sulinet.hu)

el la landoj kaj sekcioj...

1) Britio

Jarraporto de Esperanto Teachers' Association pri la jaro 2001/02

Dum pluraj jaroj, kiel pasintjare raportite, ETA spertis krizajn problemojn. En marto 2002 la jarkunveno fine, kun granda bedaŭro, **decidis malfondi la asocion** kaj fordoni ĝian bonhaston al simila organizo, kiu, ni esperas, daŭrigos ties laboron, precipe rilate al 'Urso-Kurso', sed ĝenerale rilate la instruadon de la lingvo al infanoj kaj gejunuloj.

La ekzistinta komitato estas: *Roy Simmons* (prezidanto), *Malcolm Jones* (vic-prezidanto), *Angela Tellier* (sekretario) kaj *Ian Mac Dowall* (kasisto)

Evidente, **ni daŭre deziras kunlabori internacie. La 'morto' de ETA ne signifas la morton de la brita sekcio**: daŭre restas grupo da individuaj membroj de ILEI, kiuj kompreneble informiĝos pri ILEI pere de IPR, kaj la brita sekcio flegi la kontaktojn inter EAB kaj ILEI pere de la britaj Esperanto-revuoj ('EAB Update' kaj 'La brita Esperantisto').

Malcolm Jones

2) Francio

KULTURO de SENPERFORTO kaj PACO profite al TUTMONDAJ INFANOJ

UNESKO, Nobelpremiitoj pri Paco kaj 54 demokrataj ŝtatoj decidis, ke la unua jardeko de tiu jarcento estu dediĉata al la Infaneco, al ties protekto kaj klerigo. Unesko invitas la Neregistarajn Organizaĵojn, la lernejojn, ... aktive apogi kampanjon en la jardeko 2001-2010 favore al ĉiu infano de la mondo. Tiucele la Manifesto 2000 estu diskonigata. Tiu kunagado dum la jardeko titoliĝas «*Peace in our hands, Cultivons la paix, ...*» laŭ la ses oficialaj lingvoj de UN.

PROGRAMO de EDUKO pri CIVITANECO

La franca ILEI-sekcio proponas al sia membraro dosieron ilustrantan la Manifeston 2000. Verkis ĝin Armand HUBERT, UEA-delegito pri homaj rajtoj. Tiu dosiero «*Cultivons la paix*» pritraktas la ses temojn de la Manifesto per koloraj paneloj A4-formataj. De ses monatoj, (de antaŭ la someraj ferioj) akiris ĝin deko da esperantlingvaj instruistoj por uzi ĝin en mezlernejoj en la programo de eduko al civitaneco.

Ne ankoraŭ ekzistas informoj pri uzado. La dosiero entenas: kopion de la Unesko-a apelacio, enhavo-tabelon, enkondukon *La Tero malbonfartas*, la ses temojn de la Manifesto, panelon *Metiistoj de la paco* kaj demandaron por gelernantoj.

EDUKA AGADO lige al UNESKO

Nun tiu dosiero estas esperantigita kaj alirebla en la Reto. En Esperanto ĝi titoliĝas „Paco en niaj manoj” [vd. *dorsflanke* – *NdlR.*]. Maŭro La Torre aperigas ĝin en la TTT-paĝo de ILEI < <http://lps.uniroma3.it/ilei> >.

Tradukota en ĉies landa lingvo, ĝi povas instigi samideanojn partopreni klerigan taskon favore al kulturo senperforta. Instruistoj de ĉiu landa ILEI-sekcio povas elpensi uzadon de tia dokumento en siaj propraj lernejoj laŭ naciaj intru-dispozicioj. Tia kunlaboro de ILEI-membroj plifortigos «la instruon kaj edukon agadon per diversaj edukaj projektoj lige al Unesko». La porpaca kampanjo daŭras dek jarojn: E-instruistoj trovos tempon por impliki sin.

Pliaj informoj ĉe la franca ILEI-sekcio joseph.catil@wanadoo.fr, ĉe la verkisto: Armand HUBERT - 13, chemin de la Solitude - FR-57200 SARREGUEMINES.



PACO en NIAJ MANOJ



PACO en NIAJ MANOJ Dosiero / ekspozicio.
Temoj de la Manifesto 2000, iniciita de UNESKO.

Eldonita de franca ILEI-sekcio
Verkis Armand HUBERT

La Manifesto 2000 proponas al ni pripensadon
kaj memdevontigojn je tiuj temoj :



1. RESPEKTI CHIUN VIVON

- 1.1 Respekti sian propran vivon : tabako, alkoholo, drogoj, trorapido, MST (Malsano sekse transdonebla), ... ;
- 1.2 Chies vivon.



2. RIFUZI PERFORTON

- 2.1 Pripensu pri deveno de konfliktoj ;
- 2.2 Konsekvencoj de perforto.



3. DIVIDI KUN ALIA

- 3.1 Fraleco ;
- 3.2 Metiistoj de paco (Rugha Kruco, Amnesty, Esperanto, ...)



4. AUSKULTI POR KOMPRENI

- 4.1 Akcepti dialogon ;
- 4.2 Lingva demokratio.



5. KONSERVI LA PLANEDON

- 5.1 Konstato ;
- 5.2 Chies devontigo.



6. REMALKOVRI SOLIDARECON

- 6.1 Nordo-Sudo ;
- 6.2 Urghajhoj.

3) Hungario

Komence de marto 2002 en Budapeŝto okazis la tradicia pedagogia konferenco de hungara ILEI-sekcio. En tiu ĉi jaro temis ne nur pri pedagogia kunveno kaj asembleo, ĉar la evento kunligiĝis kun la centjara jubileo de Hungaria E-Asocio kaj la 10-jariĝa festo de Eventoj. Inter la partoprenantoj troviĝis grupo de eksterlandaj gastoj kaj ankaŭ pli ol 20 hungaraj membroj de ILEI (vd. *la foton sube*). Unu el la brilaj pedagogiaj prelegoj (fare de Iván Bujdosó) baldaŭ aperos en nia revuo.

Jozefo Németh, sekciestro de ILEI en Hungario



4) Svislando

Edukado pacen

En aprilo 2001 la argentinaj esperantistoj deziris prezenti koncepton pri *edukado pacen* al nacia kongreso pri tiu temo; tiu koncepto devis memkompreneble enteni la instruadon de Esperanto. Ili demandis Atillio Orellana Rojas. Li diris, ke Mireille Grosjean devas fari tion. Mi do eksciis pri tio kaj mia pripensado komenciĝis. En majo mi povis transdoni al Sudameriko koncepton, kiun la Argentinanoj tuj tradukis al la hispana. Pro la ekonomia krizo la afero ne antaŭeniris en Argentino. La koncepto tamen plu disvolviĝis en mia kapo kaj en oktobro 2001 mi redaktis franclingvan version pli longan (4 paĝoj). Poste mi faris laŭ tio la e-o version. Mi transdonis ĝin al ILEI, ĝi nun estas sur la ILEI paĝo sur Interreto. Italoj ektradukis ĝin. Argentinanoj revizias la hispanlingvan version. En Svislando mi prezentis

ĝin al Svisa Asocio de Edukistoj Pacen (ASEPAIX). Ili metis ĝin sur sian retpaĝon www.asepaix.ch. Ili deziris prezenti sin al la gravaj instruinstancoj en la lando kaj farante tion aldoni mian koncepton. Tio signifas, ke tiu verketo iris al tiuj instancoj. Maŭro La Torre organizis ligan inter la paĝo de ILEI kaj de ASEPAIX por ke de la paĝo de ILEI oni povu trovi la koncepton en la franca. Rezulto: baldaŭ ni havos 4 versiojn: francan, esperantan, hispanan, italan. La koncepto certe estas utopia kaj neniuj lando povas enkonduki ĝin rapide kaj simple. Tamen ĝi entenas ideojn, kiujn la pedagogoj povas tuj apliki. Mi estas dankema pro reagoj iuj ajn.

Por memoro: mi verkis en la franca "Echanges de Classes Clé en Main", 280 paĝa manlibro por instruistoj pri klaso-interŝanĝoj. Vendiĝis pli ol mil. Aĉeteblas ĉe "office neuchâtelois du matériel scolaire", rue des Tunnels 1, CH 2006 Neuchâtel. Novajô: En 2002 aperos germanlingva traduko de ĝi, en la titolo estos "Austausch" von Mireille Grosjean, la eldonisto vendisto estas "ch Jugendaustausch", pf, CH 4501 Solothurn.

Mireille Grosjean

internaciaj eventoj...

1) Ni observis, lernis kaj planis (CALICO 2002)

Inter la kvarcento da partoprenintoj de tritaga konferenco de CALICO pri komputile helpata lingvo-lernado, dudeko estis esperantistoj, arigitaj en delegacio de *Esperantic Studies Foundation* (ESF). La kunveno okazis paske en la Universitato de Kalifornio ĉe Davis, malgranda sed modela universitata urbo najbare de la ŝtata ĉefurbo Sakramento. Krom tri festparoloj, estis densa programo de prezentadoj, preskaŭ ĉiuj kun praktikaj demonstraĵoj, kaj dudeko da budoj de komercaj kompanioj. Ne eblas ĉi tie resumi ĉion; kiu interesiĝas, vizitu: www.calico.org/CALICO02/

Tiris mian atenton prelego pri komputile liverata kurso de *TPR (Totala Fizika Reago)*, kio unuavide ŝajnas kontraŭdira. Frapa estis ĝia verbo-centreco, kio cetere karakterizas la plimulton de la demonstritaj programoj. Jen leciono por ni esperantistoj: transirante de libro-bazita al komputil-bazita instruado; nia enhavo migras de statika al dinamika. Ni vidis bonegan prezenton de ies matena rutino, konsistanta el amaso da praktikaj, fizikaj kaj realismaj agoj. En unu ekzerco, aperas vidbenda bildo de matenulo kun etendita mano, kun kvar objektoj flanke (dentobroso, taso, kulero, viŝtuko). Oni aŭdas unu el kvar frazoj (ekz.


Liza brosas la dentojn). La lernanto devas muse kapti kaj tiri la dentobrosan ĝis la mano de Liza. Por gratuli la ĝustan elekton, Liza tuj ekbrosas la dentojn. Je miselekto, ŝi farus nenion. En alia oni stiras aŭton laŭ voĉaj ordonoj selektitaj de la programo. La montrita bildo evoluas laŭ la stirado de la lernanto; protestante je malsekvo: *Iru dekstren - haltu ĉe la halt-signo - bone vi turnis - sed, kio? Vi ne haltis antaŭ la signo! (polica sireno).*”

Sono ludas gravan rolon en la nunaj lerno-programoj. Oni preferas uzi registritajn homajn voĉojn ol sintezitajn. Tipaj programoj permesas al lernantoj registri sian voĉon kaj kompari tion kun modela voĉo. Parol-rekonaj programoj komencas esti uzataj por funkciigo de aparatoj (lumoj ek, televidilo – kanalo dek kvin, varmigo 23 gradoj... ktp.) sed ili ankaŭ ekprenas didaktikan rolon. Se la parol-provoj de lernantoj estas rekonitaj, eblas doni voĉ-analizon komparata kun tiu de modelo. Unu programo esprimas similecon al la modelo per procentaĵoj por ĉiu vorto. Alia vidigas tion per grafikajo, laŭvorte kaj laŭlitere. Elementoj kun simileco super 80% aperas verde, sub 80% ruĝe. Tiel lernanto scias precize kiuj sonoj perfidas ŝin/lin kaj sekve bezonas ekzercadon. Alia kreas el tio diagramon de la buŝo, lango kaj gorĝo, kio eble helpas al anatomic konsciaj lernantoj. Frapa projekto menciita (ne demonstrita) rekonas la malperfektan elparolon de lernanto ĉe donita teksto, digitigas ĝin, komparas ĝin kun la digita parolo de modelo kaj laŭ tio modifas per kompleksaj algoritmoj la misan parolon por perfektigi (aŭ bonigi) ĝin. Tiel, la modela prononco kiun la lernanto aŭdas kaj alcelas, venas de ties propra voĉo!

E-sperante

Post la konferenco, la ESF-aro kunsidis tra du duon-tagoj por plani projektojn pri perkomputila lernado kaj uzo de Esperanto. Ili unue resumis la viditaĵojn el la konferenco; pro la paralelaj sesioj, multaj raportis kion aliaj ne vidis. Pluraj maturaj komercaj instru-programoj ekzistas: de *Aurolog*, *Transparent Language*, kaj multaj aliaj. Eldoni E-version de iu el tiuj provizus kadron kiu unuflanke faciligus la kreotaskon, aliflanke limigus la eblecojn; fariĝis pli favoraj la financaj eblecoj por tio. *Brigham Young Universitato* montris instigan instruadon pere de kinejaj filmoj sur DVD, ekzemple la francan per “*Chocolat*”. La multtrakaj sonaj kaj subtitolaj eblecoj liveras eblon spekti la filmon nur ĝue aŭ en la propra lingvo, aŭ la cel-lingvo, kun aŭ sen sub-titoloj (en L1 aŭ L2),

kun gramatikaj atentigoj (sone aŭ skribe), kun komentario priskriba (*nun ŝi paŝas al la tablo, prenas la leteron...*) aŭ interpreta (*ŝia miemo esprimas timon pro la enhavo...*) aŭ ekzercigaj demandoj. Tio povos montri vojon pli plene ekspluati la vidbendon *Pasporto al la Tuta Mondo*, kun ekzercoj, kurso kaj gvido por instruistoj sur DVD aŭ en retejo (aŭ ambaŭ). Poste oni resumis la proprajn projektojn en konstruo: lern-programo de Ian Fantom (GB), *E Viva!*, el Usono *Mind Scaffolds* de Duncan Charters kaj Denis Ferland, entenanta milojn da bildoj el la siatempe eldonita bildvortaro de Benson, *Curso de Esperanto* el Brazilo, k.a. En koncepta sed demonstrita stadio estas retejo ellaborata de Hokan Lundberg, Sonja Petrovic, Henning von Rosen, Clayton Smith, Arono kaj aliaj el ESF kaj TEJO-medio. Ĝi nomiĝas “*Kursejo*”, tamen ĝi estas certe pli ol ejo por kursoj, ĝi povos ekesti bunta “eduka bazaro”. Rigardu mem: www.kursejo.net. La partoprenantoj konciis pri la atingoj kaj evoluo de edukado.net tra lastaj monatoj. Ne estis fina decido kiun “podion” elekti/subteni; ĉiukaze estu kunlaboro, reciprokaj hipersaltoj kaj divi→



„Difinante la strategion.” Videblaj ĉe la tablo estas Mark Fettes (Kanado), Grant Goodall (Usono), Bertil Wennergren (Svedio) kaj Lusi Harmon (Usono)

→dado² de materialoj inter la podioj starigataj. Konsentite kaj diskutate la plano evoluigi aŭ starigi edukan retejon. La plimulto de la partoprenantoj estis retuloj kaj komputistoj, malpliis la unuavicaĵaj pedagogoj, tamen la skzitaj celoj spegulis adekvate didaktikajn kriteriojn: El inter tiuj:

- ◆ La kreaĵoj havu daŭran valoron, sed estu laŭbrike konstruataj, por ke uzeblaj eroj estu je dispono kiel eble plej baldaŭ.
- ◆ Ni kreu ĝenerale uzeblajn resursojn kaj apogu la diversecon: elekteblu diversaj lerno-stiloj, evoluigo de diversaj lertoj (aŭskultaj, parolaj, legaj, skribaj...), diversa enhavo – kursoj kun kaj sen movadaĵoj, por atingi ekvilibron aŭ neŭtralecon (en pozitiva senco).
- ◆ Pretigantoj kolektu kaj dividu spertojn, ankaŭ disponigu ilojn por faciligi al aliaj enretigi siajn materialojn.
- ◆ La retejo ofertu al progresantoj gamon da lerno-programoj, estu ankaŭ retaj babilejoj, ĉu por mikrofona/laŭtparolila konversacio, ĉu per sinkrona aŭ nesinkrona mesaĝado.
- ◆ Estu alloga(j) baza(j) kursoj, kies fino provizas malŝlosilon al babilejoj kaj aliaj faciligoj. Tiumaniere pli kompletaj kursoj povos esti pli densaj kaj kontentigaj. Estu materialo por ĉiu nivelo, ĝis inkluzive por la instruistoj.
- ◆ Ni enplektu aŭtentikajn materialojn en la kursojn (ekz. tekstoj el Monato, Kontakto k.a.). Estu sonarkivoj, bildvortaroj kaj serĉeblaj saltenhavaj gramatikoj, ligeblaj al la lego-materialoj.
- ◆ Ĉefrolu la pedagogio kaj ne la teknologio. Ni ne ofertu tro da teknikoj aŭ lern-elektoj al komencantoj – multaj el tiuj estos ankaŭ komputilaj komencantoj.

Certe tra venontaj monatoj multo progresos sur ĉi tiu kampo, ĉar la kunveninta teamo vere funkcios kiel labor-brigado. IPR raportos evoluon kaj petas artikolojn de la kreantoj de la menciitaj programoj. Ni finu per diraĵo, tre konvene tradukebla al Esperanto, de la lasta festparolinto en la konferenco de CALICO, valida por ajna instruado, sed aparte memorenda ĉe komputila: “Nia celo ne estas transdoni lernaĵojn, sed transformi lernantojn.

Stefan MacGill, Hungario.

² (© kulpas la Red.)

2) Konferenco de NRO-j ĉe UNESKO 12-14.2002

El la 343 Ne-Registaraj Organizoj partoprenis 133. Nian Ligon reprezentis Jean-Pierre Boulet kaj Renée Triolle, kaj nome de UEA ĉeestis Vincent Charlot. La Konferenco akceptis 8 rezoluciojn, proponojn por la plua agado, laborplanon ĝis la jaro 2005 kaj rekomendojn por la sekvaj 10 jaroj. Kion povas fari ILEI?

- interveni dum kunvenoj, en paŭzoj, diskuti kun homoj, proponi ĝi kiel prezidanto de kunveno por tiel aperi en la postaj dokumentoj
- traduki kaj suretigi la bazajn dokumentoj de NROj, instigi la landajn sekciojn rilati kun la naciaj komisionoj de UNESKO kaj NROj
- landaj sekcioj pripensu, kiel ili povus kontribui al la dekjara plano por senperforto kaj paco por la infanoj en la mondo, kaj post la eventuala kontribuo ili informu la estraron de UNESKO.

laŭ detala raporto de Renée Triolle

ILEI-informoj...

1) Nuligo de ILEI-Konferenco 2002

La sekvan tekston (aperintan en IPR 2001/4) ni ripetas, ĉar kelkaj membroj evidente ne rimarkis la averton: „La estraro kun bedaŭro anoncas ke **ne povos okazi ILEI-konferenco en 2002**; anstataŭe proponos pli riĉan edukan programon kadre de la Universala Kongreso kaj la “Tago de la Lernejo”, i.a. por atenti la dezirojn de la brazilaj kolegoj. La nuligon kaŭzas ĉefe la maleblo garantiigi sufiĉan partoprenantaron.”

Samtempe – laŭ estrarana sugesto – ni aldonas, ke la nuligon kaŭzis ne nur la eventuala financa risko, sed la neatendita manko de konferenca respondeculo en la estraro.

J.N.

2) La enirpaĝo al la Kvazaŭa Lernejo Tibor Sekelj

fine de marto 2002 komunikis la jenajn rezultojn: dum la lastaj 9 monatoj nia Lernejo ricevis 1500 VIZITOJN (do mezume po 166 vizitoj monate): 40% el nekonata deveno; senkonsidere de tiuj la ceteraj je distribuitaj (lando + %): FI 14, FR 14, IT 9, RU 7, BE 6, BR 6, SE 5, PL 5, JP 4, ES 3, DE 3, HU 3, NL 3, sekvas aliaj 28 landoj.

Maŭro La Torre

3) Dankanonco

Elkoran dakon al s-roj G. Pirlot (BE) kaj P J Desailly (AU) por donacoj (en jaro 2001) al nia Projekto Interkulturo.

Boomee Kim-Lindblom, estrarano de ILEI pri financoj

4) Financa Raporto de ILEI 2001³

Rezulto 2001.12.31

<u>Rimedo</u>	<u>EUR</u>	<u>Kostoj</u>	<u>EUR</u>
Membrototizoj	7405	IPR'00	1500
Konferenco	927	IPR'01	5170
Libroj	942	Afranko, tel,reto	1333
Subvencio '99/00	1350	Materialoj	393
Divers., donacoj	810	Estrarkostoj	1285
Intersezoj	364	Fakaj kotizoj	307
Ekzameno	12	Bankkostoj	319
		JA-pruntopago	1955
		Perdo	- 452
Sumo (EUR)	11810	Sumo	11810

Bilanco 2001.12.31

<u>Aktivo</u>	<u>EUR</u>	<u>Pasivo</u>	<u>EUR</u>
Kaso	26	Interkulturo	328
Bankoj: SEB-35,581 SEK	3901	Erika Linz	480
FSB-14,595 SEK	1600	Szerdahelyi	1375
PG-16,315 SEK	1788	Koleghelpo	276
UEA, ilek-a	324	Dazzini	86
JA, juna-l	168		
Nepagitaj fakturoj	357	Propra kapitalo	6800
Stoko Eldono	273		
Stoko Libroj	907		
Poŝtmarkoj	1		
Sumo (EUR)	9345	Sumo	9345

³ Por kompari: vidu „Financa Plano 2001” en IPR 01/2 sur p. 35. (Ndir.)

Ekzameno 2001 (EUR)

Saldo 2000.12.31	- 66	
Enspezoj		189
Kostoj	111	
Saldo 2001.12.31	12	
	189	189

Interkulturo-rezulto 2001 (EUR)

Saldo 2000.12.31.	291	
Donacoj		249
Kostoj	212	
Saldo 2001.12.31.	328	
	540	540

Rezulto IPR 2001 (EUR)

Presado, afranko 1-4/01	4710	
Resto de la jaro 2000	1500	
Honorario	460	
IPR-kosto	6670	(Por 2001: 5170)

Juna Amiko 2001 (EUR)

<u>Enspezoj</u>		<u>Kostoj</u>	
Saldo 2000.12.31.	1439	Presado 1-4/01	2929
Abonoj 2001	4713	Ekspedo	2790
Prunto repago	1955	Honorario	436
		Resto de presado '00	1724
		Varbilo	197
		Aliaj	31
Sumo	8107	Sumo	8107

Fonduso Erika Linz (SEK)

Saldo 2000.12.31	141367
Donacoj	551
Interzezo	5531
Saldo 2001.12.31	147449*

Fonduso Dazzini (SEK)

Saldo 2000.12.31	4755
Interzezo	6
Donacoj	292
Koleghelpo, KF	4255
Saldo	798 SEK (= 86 EUR)

*Nominala valoro de Obligacio: 140000 SEK. Interzezo 5531 SEK. 80 %, 4425 SEK/ 480 EUR (al Pasivo)

Fonduso Szerdahelyi (SEK)

Saldo 2000.12.31 14141

Donacoj	1303
Librovendo '01	3078
Interezo	165
Antaŭpago de eldono	5640
Korekto	376
Saldo 2001.12.31	12671

18687

Koleghelpa kaso 2001 (SEK)

Saldo 2000.12.31 1756

Donacoj	1526
Koleghelpo	736

Saldo 2001.12.31 2546 3282 3282

(2546 SEK / 276 EUR)

Financa Plano 2002

Rimedo	EUR	Kostoj	EUR
Membrokotizoj	6000	IPR	5600
Libroj	1000	Afranko, tel, fakso ktp.	1200
Eldonaĵoj	700	Estrarkostoj	1300
Subvencio UEA	1300	Materialo, kopiado	600
Interzezoj	700	Eldono	600
Juna Amiko	700	Fakaj kotizoj	500
Diversaĵoj	600	Interkulturo	1000
		Diversaĵoj	200
Sumo	11000	Sumo	11000

Boo Mee Kim-Lindblom, Kasisto de ILEI



Atilio Orellana Rojas kaj Niza Kuiterman dum la 18-a Somerkursaro en Aŭstralio (vd. p. 21)

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana
✉: selimib@albmail.com

Argentino: Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Kay Andersen, P.O. Box 186, Moorooka AU-4105
✉: kjand@ozemail.com.au

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

✉: raymond.wylleman@pi.be
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcolm Jones, 1 Regent Avenue, Skipton, GB-North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratiškovice 938

✉: mmelicharek@iol.cz
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part,

Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan

✉: zdchen@public.wh.hb.cn
Finlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690,

FI-25700 Kimito

✉: camtskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,

✉: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász

✉: jozsef@nl-papa.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran

✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma

✉: vmadella@tin.it

Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001

✉: masumi-s@gw3.gateway.ne.jp

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus
✉: ileicat@hotmail.com

Kroatio/KEL: Ankica Jagnjić, Stubička 75,

HR-10000 Zagreb,
✉: ankica.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana

✉: kubesp@ip.etecca.cu

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172,

NL-2585 11W Den Haag,
✉: lei001@worldonline.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33

NO-1396 Billingstad
✉: bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+48 12) 638 14 49

Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7,

RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova, Moloznaja 38-10, Odincovo 2,

Mosk. obl. RU-143000
✉: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby

✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: François Randin, Str. Vallombreuse 14,

CH-1004 Lausanne
✉: francisko@courrier.com

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lomé-TOGO,

✉: exp.togo@cafe.tg

Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US)

✉: 72644.2450@compuserve.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52,

AM-375062 Erevan

Bosnio kaj Hercegovino:

Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima

Región ✉: strigo@ctcreuna.cl

Estonio: Helgi Ilmova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Mellberg Sigurjónsson, Norðurbraut 33, I.h., IS-220 Hafnarfjörður,

✉: loftur@skyr.is

Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

Jugoslavio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, YU-32000 Čačak ✉: radp@ptt.yu

Kongio: Ngangu Nduantoni-Bakidila,

B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaïre)

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha

Universitato, Incheon 402-751, Koreio ✉: sheho@inha.ac.kr

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981,

CR-1000 San José
✉: miamiam1@racsa.co.cr

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93,

LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186

The Terrace, NZ-Wellington 1
✉: gwenda.s@ihug.co.nz

Portugallio: João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq

Vale Grande, PT-1675 Pontinha

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.

✉: Marija.Zlatnar@quest.arnes.si

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108,

Luck-26, UA-43026

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taškent, CIS

✉: eugeny@esper.giml.com

Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, VE-Caracas 1071 A

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: bmaxey@visi.net
Elekta: Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil
Kontrolo: Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin
Lerneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz,
Mauro La Torre, Raita Pyhälä
Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen
Terminara: Mauro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

FIPLV (*Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj*)

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: esperanto@Education.monash.edu.au

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Mauro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Baucó, Chemin de la Civade Verte, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: mireille.grosjean@jpn.ch

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064. La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175*, ✉: boomee.kinlindblom@swipnet.se, postĝirkonto: 682117-7. IBAN (Internacia Bank-konto) numero: SE 2595 000099 604206 821177. *Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSSESS*. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nve. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64*. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 39 de Jarlibro 2001. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan-grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcio reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://il.uniroma3.it/ilei>

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IIIÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: www.nl-papa.hu/ipr; jozefo@nl-papa.hu; jozefo_nemeth@hotmail.com, tel: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze). +36-89/ 324-896). Nia vicredaktorino: katalin@ikso.net. La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leg-handikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 16-an de aprilo 2002, redaktfino por la sekva numero: la 15-a de aŭgusto 2002.